R.A.D.E. Informilo

ROTARIA AMIKARO DE ESPERANTO

Numero 19 *Marto 2008*

Amikan saluton, karaj RADE-anoj!

Kio nova en nia Amikaro dum la lastaj ses monatoj?

La Unuiĝintaj Nacioj deklaris 2008 kiel Internacian Jaron de la Lingvoj.

Kial? Ĉar ĉiujare lingvoj estas minacataj malaperi, tiel kulturoj malaperas kaj ni, esperanto parolantoj, ja havas valoran proponon por protekti naciajn etnolingvojn.

En nia lasta informilo ni invitis vin, inter alie, al publikigo de artikoloj en viajn naciajn revuojn pri la problemo de la internacia komunikado.

Nia membro Joseph van der Vleugel sukcesis, ĵus en marto, aperigi en sian landan revuon "Rotary Contact", en Belgio, artikolon pri Esperanto.

Pro liaj trafaj argumentoj favore al niaj proponoj, vi legos sekve tiun artikolon tradukitan al Esperanto kaj ankaŭ en la originala franca.

Prave samideano Vleugel atentigas, ke la propono enkonduki laŭgrade la Internacian Lingvon en Rotariajn klubojn tra la mondo provokas jen kaj jen rideton, tre verŝajne pro manko de sufiĉa informo.

Sed samtempe li klarigas ke la nura pontolingvo, kiu respektas la kvar etikajn principojn de R.I., devas esti neŭtrala lingvo sen naciaj interesoj.

La Estraro de RADE invitas vin traduki la tekston de Vleugel al viaj naciaj lingvoj, al la japana, sveda, angla, itala, litova ktp. kaj aperigi ĝin okaze de la Jaro de la Lingvoj en viajn rotariajn revuoj. Certe vi ne trovos grandajn malfacilaĵojn, ĉar la temo estas tre aktuala!

La belga monata revuo ROTARY CONTACT publikigis en marto 2008 la sekvan artikolon de la RADE - ano Joseph van der Vleugel, membro de la Rotaria Klubo Spa-Francorchamps-Stavelot, Distrikto 1630, Belgio.

ĈU NECESAS INTERNACIA LINGVO POR PLI BONA KOMUNIKADO EN ROTARY?

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris 2008 kiel "La Internacia Jaro de la Lingvoj" kaj invitas kuraĝigi ilian konservadon kaj defendon.

Same kiel UN, Rotary International estas internacia institucio kiu respektas la kulturojn kaj la rajtojn de ĉiuj civitanoj. Tio signifas ke ĝi rekomendas la uzon de multlingveco, sed tio havas malfeliĉe limigojn. Esperanto, lingvo kreita por esti internacia, konstituas unikan solvon por esti ponto inter la kulturoj.

La Leĝfara Konsilio (COL) 2007 de RI ne akceptis la proponon 07-411, prezentitan de brazila distrikto, kiu rekomendas laŭgradan enkondukon de Esperanto kiel dua lingvo post la loka lingvo en la internaciaj komisionoj de ĉiu rotaria klubo por faciligi la realigon de humanitaraj kaj kulturaj programoj, kiuj nuntempe frontas lingvajn barilojn.

La nura oficiala lingvo de la Leĝfara Konsilio estis la angla, sed oni proponis servojn de simultana tradukado al la franca, hispana, portugala, korea kaj japana.

Al la venonta Konsilio en 2010 probable oni devas aldoni la hindan kaj la rusan lingvojn, kiuj laste estis akceptitaj. Ne ekzistas dubo, ke en la proksima estonteco pliaj lingvoj devos esti akceptotaj kaj estus maljuste malrespekti eĉ nur unu el ili.

LANGUE

Mars - Mars / 2008

Faut-il une langue internationale pour mieux communiquer au Rotary ?

L'assemblée générale des Nations Unies a proclamé 2008 'année internationale des langues' et demande d'encourager leur conservation et leur défense. À l'instar de l'ONU, le RI est une institution universelle respectueuse des cultures et des droits de tous les citoyens. Il prône naturellement le multilinguisme, mais ce dernier a malheureusement des limites et l'espéranto, langue à vocation universelle, constitue un outil inédit pour relier entre elles les cultures.

Le Conseil de Législation (CoL) 2007 a refusé la proposition 07-411, présentée par un district brésilien, préconisant *"l'introduction graduelle de l'espéranto comme deuxième langue après la langue locale dans la commission interactivate de chaque club afin de faciliter la réalisation des programmes humanitaires et culturels qui, actuellement, affrontent des barrières linguistiques."*

La seule langue officielle du CoL était l'anglais mais des services d'interprétation simultanée étaient proposés en français, espagnol, portugais, coréen et japonais. Au prochain CoL, en 2010, il faudra probablement y ajouter l'hindi et le russe qui ont été adoptés récemment. Il ne fait aucun doute que d'autres langues devront être admises plus tard et il serait injuste d'en exclure une seule. En conclusion, le RI va se retrouver dans la situation de nombreuses institutions internationales : une langue nationale hégémonique (anglais) à côté d'une multitude de langues nationales plus ou moins admises suivant la puissance économique ou politique de leurs locuteurs. Cette situation est inéquitable à de nombreux points de vue et l'utilisation de l'espéranto représente à langue échéance une option raisonnable, à condition de bien évaluer les enjeux. Pour juger la proposition d'introduire progressivement l'espéranto comme deuxième langue, il semble donc logique d'appliquer le critère des quatre questions.

1. **Est-ce conforme à la vérité ?**
   Il est vrai que les langues présentent une barrière à la bonne communication et que seule une minorité trouve les opportunités d'apprendre une, deux ou plusieurs langues étrangères. Il est tout aussi vrai que l'espéranto présente l'avantage d'être plus facile et moins coûteux à l'apprentissage. De plus, c'est une langue neutre préservant la valeur de toutes les autres.
2. **Est-ce loyal de part et d'autre ?**
   À partir du moment où nous devons fournir le même effort pour une même langue afin de communiquer sur un pied d'égalité, nous nous engageons ensemble dans une voie respectueuse des droits et devoirs de chacun.
3. **Est-ce susceptible de stimuler la bonne volonté réciproque et de créer de meilleures relations sociales ?**
   L'espéranto est le moyen de communication international d'une communauté estimée à quelque deux millions de locuteurs.
   Faire le même effort pour mieux se comprendre ne peut que créer de meilleures relations sociales.
4. **Est-ce profitable à tous les intéressés ?**
   Pour les unilingues, cela sera l'occasion d'apprendre une langue plus abordable et un excellent tremplin vers d'autres langues. Les polyglottes, eux, n'auront guère d'efforts à fournir pour devenir espérantophones. Seuls les unilingues anglophones devront renoncer à leurs avantages. En contrepartie, quittant une position hégémonique, ils retrouveront une ouverture plus grande vers d'autres cultures et une reconnaissance de toutes les nations.

La proposition d'introduire progressivement l'espéranto en a fait sourire plus d'un, probablement par manque d'information. Pourquoi rejeter une proposition qui répond au critère des quatre questions ?
En cette année internationale des langues, je demanderais aux sceptiques d'assister au prochain Congrès Universel d'Espéranto à Rotterdam du 19 au 25 juillet 2008. La "langue internationale" fonctionne aussi bien que le Rotary et depuis 1905, année de création du Rotary et du premier Congrès Universel d'Espéranto, il y a dans le monde au moins autant d'espérantophones que de Rotariens.

Joseph van der Vleugel
Rc Spa-Francorchamps-Stavelot

18

Konklude, R.I. sin trovas en la sama situacio kiel multaj internaciaj institucioj: hegemonia nacia lingvo (la angla), flanke de moltitudo de naciaj

lingvoj pli-malpli akceptataj depende de la ekonomia aŭ politika forto de la parolantoj. Tia situacio estas nejusta laŭ diversaj vidpunktoj kaj la utiligo de Esperanto reprezentas longdaŭre logikan solvon, kondiĉe de honesta pritakso. Por prijuĝi la proponon enkonduki laŭgrade esperanton kiel duan lingvon, ŝajnas do logike apliki la kriteriojn de la kvar etikaj principoj de R.I.:

1.Ĉu estas vera?

Estas vera ke la diverseco de la lingvoj reprezentas barilon al bona komunikado, kaj ke nur minoritato trovas la oportunecon lerni unu, du aŭ pli da fremdaj lingvoj.

Estas ankaŭ tute vera ke Esperanto reprezentas grandan avantaĝon, ĉar la lernado estas pli facila kaj malpli kosta ol naciaj lingvoj. Krome ĝi estas neŭtrala lingvo kiu protektas la valorojn de ĉiuj aliaj idiomoj.

2. Ĉu estas lojala al ĉiuj?

Konstatante la fakton ke ni ĉiuj faras la saman klopodon por la sama lingvo por povi komuniki egalrajte, ni engaĝiĝas kune sur vojo de respekto de ĉies rajtoj kaj devoj.

3. Ĉu ĝi stimulas la reciprokan bonan volon kaj pli bonajn amikajn rilatojn?

Fari la samajn klopodojn por pli bona komunikado nur povas krei plej bonajn sociajn rilatojn.

4. Ĉu ĉiuj interesitoj profitas?

Por monolingvistoj estos bona okazo lerni pli facilan lingvon kaj krome Esperanto reprezentas fenestron al pliaj naciaj lingvoj.

La poliglotoj ne havos problemojn por iĝi Esperanto parolantoj. Nur la anglofonaj monolingvistoj devas rezigni pri siaj avantaĝoj. Tamen ili forlasos sian hegemonian pozicion kaj trovos pli grandan malfermon al aliaj kulturoj kaj la admiran rekonon de ĉiuj popoloj.

La propono laŭgrade enkonduki esperanton provokas jen kaj jen rideton, verŝajne pro manko de sufiĉa informo.

Kial forĵeti proponon kiu respondas al la kriterioj de la kvar etikaj demandoj?

En ĉi tiu Internacia Jaro de la Lingvoj, mi invitas la skeptikulojn partopreni la venontan Mondan Kongreson de Esperanto en Rotterdam (19-a ĝis 26-a Julio 2008). La "internacia lingvo" funkcias same bone kiel Rotary International ek de 1905, jaro en kiu naskiĝis R.I. kaj okazis la unua Universala Esperanto Kongreso.

En la mondo ekzistas almenaŭ tiom da Esperanto parolantoj kiel rotarianoj.

VENONTAJ RENKONTIĜOJ DE NIAJ MEMBROJ

15–18 junio 2008 - Monda Kongreso de R.I. en LOS ANGELES (Usono).

Ĉiuj vi estas kore invitataj partopreni tiun eventon kaj viziti la standon de RADE, fakte la nura teritorio libera de lingva problemo en la kaosa "Domo de Amikeco". La plimulto de la partoprenantoj tie apartenos al la kategorio de anglofonaj monolingvistoj, kiel nia amiko Vleugel nomas amuze la "mezan usonanon"! Ni parolu tie al ili pri facila Internacia Lingvo.

19–26 julio 2008 - Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam (Nederlando).

Dum la Movada Foiro, RADE havos sian standon kie kunvenos ĉiuj rotarianoj partoprenantaj la kongreson. Dum la Semajno ni vizitos plurajn rotariajn kunvenojn en Nederlando.

Por daŭre aktualigi nian reton de membroj, ni petas vin plenigi la suban enketilon kun la necesaj informoj kaj resendi rete al la adreso de la sekretario Giuseppe Grattapaglia: bonaespero@terra.com.br

Konfirma enketo de ĉiuj RADE membroj

1.Kompleta nomo: _____

2.Retadreso:_____

3.Poŝta adreso: ___ _____4.Lando: _____

5.Nomo de la rotaria klubo: _____ 6. Distrikto: _____

7.Profesia Klasifiko: _____ 8. Rotariano ek de kiam: _____

9.Plano partopreni Kongresojn 2008: _____ _____

_____ _____

_____

Renkontiĝo de rotarianoj belgaj kaj brazilaj en novembro 2007, en la hejmo de RADE-ano Michael Cwik, en Bruxelles.

PLIA HUMANITARA PROJEKTO DE R.I.

realigita inter la kluboj de RADE-anoj de la distriktoj 4530 (Brazilo) kaj 1620 (Belgio), kunlabore kun franca kaj angla distriktoj

Unu el la problemoj por realigi projekton de socia helpo estas trovi partneran rotarian klubon eksterlande kaj solvi la neeviteblajn lingvajn problemojn de tiu kunlaboro dum monatoj eĉ jaroj. Por ni, esperanton parolantoj, feliĉe tiu ne ekzistas.

Unu el inter multaj sociaj necesoj de la urbeto Alto Paraiso de Goiás en Brazilo estis la manko de veturilo por urĝaj intervenoj en vasta teritorio por savi infanojn kaj adoleskantojn en riska situacio pro familiaj mistraktoj, provokitaj de alkoholismo kaj perfortoj.

Danke al la komunaj klopodoj de kvar rotariaj distriktoj kaj de la Rotaria Fondaĵo en Evanston, la Infanprotekta Konsilio en Alto Paraíso ricevis donace aŭtomobilon kies transdono al la junaj gekonsiliistoj kaj al la vicurbestrino okazis kun la ĉeesto de la Distrikta Guberniestro Moacir Lázaro de Melo kaj lokaj aŭtoritatuloj.

La prestiĝo de Rotary kiel Internacia Organizo de Volontula helpo al sociaj bezonoj ĉie en la mondo estas plensignifa en la regiono norde de Brasília.

Ni invitas niajn RADE membrojn informi la Estraron pri la realigo de Humanitaraj Projektoj (la Rotaria Fondaĵo nomas ilin *Matching Grants)* de siaj kluboj kaj kiujn lingvojn viaj kluboj utiligas pro la komunikado. Kvankam ni scias ke la angla estas la plej uzata lingvo inter rotarianoj, tamen ni planas fari statistikon pri la uzo de naciaj lingvoj.

Se iuj inter vi havas interesajn informojn pri la JARO DE LA LINGVOJ, bonvolu sendi ilin al la sekretariejo por publikigo en la venonta bulteno.

Simpla solenaĵo por transdoni la ŝlosilon de la veturilo donacita de Rotary Club Alto Paraíso al la Infanprotekta Konsilio de la urbo.